




Kulturaĵ Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro :

H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj
ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 N. Fkoj

Subtena : 5 N. Fkoj

Bonfara : 10 N. Fkoj

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaĵ kajeroj

Epineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349 62

~~~~~ (Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4) ~~~~~

1960

JANUARO - FEBRUARO

1

# KULTURAJ KAJEROJ

1960

Januaro - Februaro

## Dumonata informada kaj kultura revuo

### REDAKCIA KOMITATO :

#### Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson  
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

#### Komitatoj :

René Watier  
Paul Guillot  
Frédéric Thébaud  
Pierre Chevalier

#### Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)  
Julio Baghy (Hungarujo)  
Delfi Dalmau (Hispanujo)  
Alberto Barrocas (Urugvajo)  
Hannes Koivu (Finnlando)  
Robert Martin (Francujo)  
Eugeniusz Matkowski (Pollando)  
William Perrenoud (Svislando)  
M. de Waard (Nederlando)  
kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj.

### ENHAVO

..

**Zigzage laŭ Fantazio** (J. Baghy).

**Esperanto tra la mondo.**

**El ie en la Mondo :**

La lando de dekmiloj da lagoj (H. Koivu).  
Tecdoro Herzl (M. de Waard).

**Turismo :**

Bretenio vin vokas (I) (R. Martin).

**Anjou ilustrita.**

**Gramatikaj Respondoj.**

**Libero kaj Obeo** (Delfi Dalmaŭ).

**Tra la Esperanta Literaturo - A. Grobowski.**

**Por via distro :**

**Nia Konkurso.**

**Fantaziaĵoj :**

La Familia Artifiko (A. Allais, trad. F. Lallemand)

### KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

### KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

### KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

### KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

### KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

JULIO BAGHY skribis por vi:

# ZIGZAGE LAŬ FANTAZIO

(Fragmento el letero)

... Vi skribis, ke du demandoj turmentas vin postulante respondon : 1) Kio estas astrologio ? 2) Ĉu la muziko estas parto de la kosma penso aŭ la tuto ?

La demandoj ekspronis mian fantazion. Permesu, ke mi prezentu la opinion de « poeto », kies fantazio plej ofte senbride zigzagas.

1) La modernaj ĉiosciantoj asertas, ke la astrologio estas pseudoscienco, fakte nur superŝticia arto por trompi siajn adeptojn kaj la kredemulojn. Jes, tia estas la aserto, sed la modernaj scienculoj ofte neas tion, kion ili ne komprenas, miskomprenas aŭ simple neglektas. Scienco estas la **astronomio**.

Laŭ mia imago en antikva epoko la astrologio kaj astronomio formis kunkreskintajn gemelojn kaj — tre verŝajne — en la antaŭhistoria tempo oni havis nur astrologion, kies pli pozitivaj sperteblaj fenomenoj fariĝis la bazo de astronomio.

La pratempa primitivulo same kiel la hodiaŭa instruisto rigardas al la stelplena firmamento kaj tiam sugestis **KREDON**, dum nun ĝi donas jam parton de **SCIO**. Intence mi forlasis la artikolon, ĉar ĉio, kion la modernaj teleskopogigantoj nun igas proksima al ni, estas parto scio sekve scioparto de la **SCIO** : la eterna kosma Penso. Ĝi riveliĝas disigite en miliardoj da formoj por komplete krei **UNU TUTON**, preskaŭ nepercepteblan per la homa menso. Kial ? Ĉar la **limigiteco** neniam povos perforte percepti la **SENLINEGON**.

Do la iam kunkreskintaj gemeloj, **KREDO** kaj **SCIO**, disigis kaj nome fariĝis **ASTROLOGIO** kaj **ASTRONOMIO**. Alivorte la astrologio estas scienco de **SENTOJ** kaj la astronomio estas scienco de **SENSOJ**. Nek la unua, nek la dua estas pseudoscienco, sed ili ambaŭ nun aparte respegulas tion, kion ili kune montris en la antikva epoko : la reale nepercepteblan kaj percepteblan partojn de la **KREANTA VIVO** en senfinaj vicaj kaj nombroj de **UNIVERSOJ**.

2) Kio estas muziko ? Ritma sonaro, unu-aŭ diversforma vibrado de tiuj miliardoj da formoj, kies kuna tuto konsistigas la **VIVON**. Sekve de tio la muziko estas la ritma, ĉie ĉeestanta, unu-aŭ diversstone vibranta sonaro de la **KREANTA VIVO** : la melodio de la **UNIVERSOJ**, la parolo de la **KOSMO**.

Ni ne tre bone scias, ke ekzistas vibroj percepteblaj kaj nepercepteblaj per la homa aŭdorgano ; ankaŭ tion ni scias, ke centmiloj da melodioj estis jam aŭdataj, pliiuste perceptataj ne per la oreloj. Oni pensu momenton pri la komponaĵoj de la surdiga **BEETHOVEN**, kiu certe aŭdis ĉiun sonon de siaj simfonioj dum la komponado aŭ poste rigardante la muziknotojn, kvankam li estis absolute surda. Jes, li aŭdis, sed ne per la oreloj.

Estas supozeble, se la homo kapablis fiksi sian aŭdorganon al certaj ondolongoj, ke li povus kapti laŭplaĉe la melodiojn krozentajn per diversaj ondolongoj kaj oni ne bezonus radioaparaton ; sufiĉa estus sonfortiga megafono ĉe la oreloj. Eble eĉ ne tio ! Nu jes, sed la homo ankoraŭ ne kapablas fiksi sian aŭdorganon por certa ondolongo, kvankam la homa arganismo estas la plej perfekta aparato elektra, la plej mirinda radio-stacio por akcepto kaj disradiado de **PENSOJ**, **SUGESTOJ**, **SIMPATIO** kaj **ANTIPATIO**. Tiu ĉi homa radioaparato per ĉiuj siaj nervoentenoj perceptas la muzikon kaj parolon de la **VIVO** kaj agas, evoluas plu laŭ la sugesta pensoforto de la **KREANTA VIVO**.

La homa fantazio ja povas image skizi tiagradan progreson, kiam post jarmiloj la homo havos novan senson, nome organan selektilon por ondolongoj de sonoj kaj pensoj. Tiu ĉi nova organo eĉ la homan lingvon farus superflua. Oni ne devus lerni sonan lingvon ; estus sufiĉe per la selektosenso kapti la pensoondojn, por ke la asociado de ideoj estu daŭraj kaj reciprokaj eĉ se oni pensadus en du diversaj lingvoj. Kial ? La ideoj je havas samajn bildojn en ĉiu cerbo, sole la songrupoj elvokantaj la saman bildon, estas diversaj. Fakte do ne la bildoj diferencas, nur la songrupoj riĉe varias. Multlingveco ne signifas ideoriĉon, nur abundon da songrupoj por samaj ideoj.

Kaj nun ree staras antaŭ mi via demando « Ĉu la muziko estas parto de la kosma penso, aŭ la tuto ? » Konkludante el la supre diritaj mi riskas aserti, ĉar ĉiu vibro havas sonon, ĉiu sono estas muzika — egale ĉu ĝi estas unu-aŭ diversstone ritma, ĉu ĝi estas perceptebla aŭ neperceptebla — do mem la kosma penso estante vibrado prezentas kosman muzikon, en kies efiko nestas la kreoforto kaj kreopovo de la **KREANTA VIVO** en mil miliardoj da formoj tra universoj.

Jen vi skribas : « Por krei muzikon oni bezonas ne nur ritmon, melodion, harmonion, sed ankaŭ formon. Kiu komprenis formon ? Ĉu la antikvaj grekoj ? Ili kapablis skulpti sen modeloj (kaj kiel) ? »

Vi plene pravas, kiam vi pensas pri la skulptado de la formo ekstera, kiu perfekte reflektas harmonion de proporciroj en la greka skulptarto antikva. Sed kio estas formo ekstera ? Pulpo ĉirkaŭ kerno. En kerno kaŝiĝas ĉiam la senco : speco kaj vivoĝermo. La kernon, la formon internan la grekoj malpli konis, sekve ili malpli kultivis ol la antikvaj egiptoj, hindoj, ĉinoj kaj nun bedaŭro mi asertas, ke ju pli teknikigis la civilizacio (ekstera formo), des pli vualigis la kulturo (interna formo).

La interna formo esprimiĝas unue en simboloj kaj en artoj spontanaj, (danco, fajfo, kanto) ; due en prezentaj artoj (deklamado, aktorado interpreto de muzikajoj) ; trie en senpere kreaj artoj (verkado, komponado). La ekstera formo revelacias sin ĉefe

en la kvara grupo, en **instrumentaj artoj** (skulptado, pentrado). Tiuj kvar grupoj de artoj kune kaj laŭ kultivateco donas fidelan spegubildon pri la formoj interna kaj ekstera de iu popolo aŭ epoko. La proporcia divido de tiuj ĉi artotipoj ebligas konstati laŭ la kultivateco la gradon, kvaliton, rilatojn al la formoj ekstera kaj interna.

La unuaj tri grupoj (simboloj, spontanaj, prezentaj kaj senpere kreaĵ artoj) **preskaŭ ĉiam klopodas evidentiĝi, videbligi, sentebliĝi la formon internan**. La kvara grupo (instrumentaj artoj) **preskaŭ ĉiam prezentas la formon eksteran**. La fonto de la inspiro por la unuaj tri grupoj plej ofte estas : emocio, penso, sentimento daŭra, sugesto de travivaĵoj, impresoj, imagoj. Ili estas la **artoj de la sentoj**. La kvara grupo estas inspirata plej ofte de la videbla realaĵo, naturo, sugesto de konkretajĵoj. Ili estas la **artoj de la sensoj**.

Sendube, ke ĉe la antikvaj grekoj **proportio**, la kultivado de la kvara grupo superis la kultivadon de tiuj artoj, kiuj trovigas en la unuaj tri grupoj kaj tial mi diris, ke la grekoj estis majstroj de la formo ekstera en tiu epoko, kiam la egiptoj, hindoj, ĉinoj superis ilin en la artoj de la formo interna. Tamen ne estu miskompreno ! Neniel mi deziras

aserti per tio, ke la greka antikva kulturo estis malpli valora kaj malpli epokfara por Eŭropo kaj ke ĝi ne havis majstro-verkojn ankaŭ en la artoj de la formo interna. Objektive : Oriento prefere kultivadis tiujn artojn, kies bildoj formiĝis interne sub influo de la senbrida fantazio ; Okcidenton influis pli la realaĵoj. El la reciprokaj efikoj dum longdaŭra paco povos formiĝi nova, internacia kulturo, en kiu ekvilibran proporcion havos ĉiu grupo de la artoj.

Amiko, via demandema meditado, viaj preferataj studobjektoj kaj la artista memo de ni ambaŭ igas konjekti, ke nin ambaŭ interesas pli la formo interna ol la ekstera... almenaŭ min plej ofte inspiris tiu interna melodio, neperceptebla per oreloj, kiu serĉis vortojn por lome interpreti tion, kion nur mi audis kaj plej ofte impresis min tiuj nevideblaj, sed diveneblaj internaj psiaĵoj fenomenoj, per kiuj mi povis krei miajn romanfigurojn... kaj fine ni ambaŭ, amiko, partoprenas en kolektiva kreado de artoj, kies ĉiu elemento estas interna kreaĵo : literaturo de internacia lingvo. Iam ĝi — mi esperas — respegulos la internan memon de tiu nova homotipo, kiun la KREANTA VIVO produktos sur nia komuna patrujo, sur la Tero.

## Esperanto tra la Mondo



### ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ EN 1930

**45-a Universala Kongreso de Esperanto, Bruselo** : Skribu al tiu adreso se vi deziras ricevi per via grupo, bazan artikolon por « belga vespero » kaj turisman fotoaŭson.

**16-a Internacia Junularo Kongreso** : Rotterdam (23-30 Julio). Eendrachtsweg 7, Rotterdam 2. Franca respondeculo : J.-P. Colnot, 16 av. Déroulde, Laxou, (M-et-M.).

**Junularkunveno dum Pasko** : en Junulargastejo, en Nigra Arbaro (14-18 Aprilo). Germana Esperanto-Junularo T 6/18, Mannheim. Por Francio : « Esperanto », Maison des Jeunes, 27, rue de la République, Nancy.

**Internacia Kongreso de SAT** : Aarhus (Danio) — 23-29 Julio. Magnus Jacobsen, Rydersvej 9, Aarhus.

**Franca Nacia Kongreso de U.E.F.** : Montélimar (4-6 Junio). « Esperanto-grupo, Route de Châteauneuf, Montélimar, Drôme.

**Esperanta porjunula Seminario** : en tendaro, dum somero, apud Bled (Jugoslavio). Jugoslavia Esperanto-Federacio, Miklošičeva 7, Poŝtfako 275, Ljubljana.

**Franca Kongreso de Sat-Amikaro** : Aubenas, dum Pasko. Sro Petro Jayer, Chemin de Baza, Aubenas, Ardèche.

### NOVA TEKNIKA TERMINARO.

Teknika Terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj, redaktita de franca inĝeniero S-ro Brolise, aperis en la suplemento 1959 de la Jarlibro de U.E.A.

### FAKA ASOCIO POR KURACISTOJ KAJ APOTEKISTOJ.

« Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio » estas nun reorganiziĝinta. Adreso : D-ro Maria Jarnuszkiewicz, str. Mazowiecka 69, Krakow, Pollando.

### ASOCIO DE TEATRAJ KAJ FILMAJ ARTISTOJ.

Prezidanto : S-ro Flego Srdjan, 67, Boul. Pasteur, Paris (XV°).

### FRANCA FAKA ASOCIO DE POSTISTOJ.

La francaj poŝtistoj povas nun aliĝi al « P.T.T. Franca Esperanto-Asocio », 20, avenue de Ségur, Paris (7°). La asocio deziras kontaktiĝi kun samaj asocioj en aliaj landoj kaj kolekti la teknikajn vortojn.

### EKSPERIMENTAJ DISSEDOJ EN ESPERANTO.

« La Voĉo de Ameriko » tutmonda radioservo de la usona registaro decidis dissendi eksperimentan serion da programoj en esperanto. En ses sinsekvaj semajnoj, ĉiu programo de 30 minutoj estos dissendata trifoje ĉiun vendredon, je 12.00, 13.00 kaj 23.00 h. ek de la 11-a de marto. Eble nur la lasta estos aŭdebla en Eŭropo. Ondlongoj : 31,28 m. kaj 30, 74 m. Adreso : D-ro Solzbacher, Voice of Ameri-

ca, Rm. 2528 Hew, Washington 25 DC., U.S.A. Sendu raporton pri la ricevo de la programoj.

### INTERNCIA DIPLOMO.

U.E.A. starigis Internacian Ekzamenan Komisionon, kiu liveros altnivelan diplomon. Ekzamenobjektoj : Gramatiko, literaturo de esperanto, historio de la movado, terminaroj, Instrumetodoj, pedagogio. Unuaj ekzamenoj en Bruselo, antaŭ kaj post la Kongreso. Adreso por informoj : S-ro N. R. Smith, 75, South Ealing Road, London W. 5.

### LA CENTJARO DE ZAMENHOF.

La 100-a datreveno de Zamenhof estis solene festata en multaj urboj. En Varsovio kaj Kopenhago, ministroj ĉeestis kaj la radio kaj televido raportis. En Nederlando, Svedujo, Germanujo, Belgujo, la manifestacioj estis aparte sukcesintaj. En Leningrado memorkunvenoj kun pluraj prelegoj okazis. Pli ol 300 esperantistoj ĉeestis. Granda soleno en Budapeŝto. En New-York ekspozicio kaj parolado de lingvisto Mario Pei, de la nevo de Zamenhof kaj de S-ro Claude Piron, prezidanto de U.N.O.-Esperanto-Klubo.

En pluraj landoj stratoj ricevis la nomon Zamenhof.

Bona artikolo en « Unesko-Kuriero ».

Paroladoj en kvar francaj regionaj radio-stacioj.

### NOVA ESPERANTA POSTMARKO.

La tria poŝtmarko pri esperanto aperis en Bulgario, en decembro, kun portreto de Zamenhof kaj teksto en internacia lingvo.

### VASTA PETSKRIBO EN NEDERLANDO.

Post granda sukceso de la kursoj de esperanto en pluraj gazetoj, pli ol 800.000 subskriboj estis kolektitaj favore al instruado de Esperanto en la leŝnejoj.

### EL LA BALTAJ SOVETAJ RESPUBLIKOJ.

— En Kaunas restarigo de la nomo de Strato Zamenhof.

— Grupo de Estonaj esperantistoj vizitis la Latvian kaj Litovajn esperantistojn.

— La unua tendaro de la esperantistaj studentoj de la tri baltaj respublikoj okazis lastan someron.

### EL ĈINIO.

La revuo « El Popola Ĉinio » publikigis liston de multaj literaturaj verkoj publikigitaj en ĉina lingvo el la esperanto traduko.

### EL BRAZILIO.

« Radio Jornal do Brasil » dissendas nun tri fojojn semajne esperanto-programon de 30 minutoj per mezaj kaj mallongaj ondoj.

### DISKO EN ESPERANTO.

Tria disko de kantoj en esperanto estis eldonita de Esperanto-Filmo, Germanujo : Adreso : Rudi Biernath, Ackerstrasse 53, Braunschweig, Germanujo.

### GEMELIGOJ DE URBOJ.

Augsburg (Germanujo) kaj Amagasaki (Japanujo) decidis ĝemeliĝi pere de Esperanto. Interŝanĝo de sonbendoj kaj diapozitivaj okazis.

Bad-Kissingen (Germanujo) kaj Massa (Italujo) ĝemeliĝis sammaniere.

Esperanto-kursoj komenĝis en la du urboj.

### SUR LA TURISMA KAMPO.

« Nederlanda esperanto-adresaro por la turismo » aperis ; ĝi entenas liston de loĝejoj, restoracioj, muzeoj, vojaĝ-oficejoj, kie oni parolas la internacian lingvon. Havebla ĉe : V.V.V., Rokin 5, Amsterdam-C.

S-ro Retot, 162, Boulevard A-Briand, Montreuil (Seine), eldonis « Gvidlibro al la Lazura marbordo » (5 steloj aŭ 1.60 NF) ; « Eta interpretisto franca » (3,5 steloj aŭ 1,20 NF) ; « Esperanto parolata (adresaron de entreprenoj, 3,5 steloj aŭ 1,20 NF).

## Kelkaj notoj pri Belgujo

lando de la 45-a Universala Kongreso

★

Simpla rigardo sur la mapon atestas, ke tiu lando situas ĉe la volkrucigo de Eŭropo : ĉiuj grandaj trafikarteroj, laŭ kiuj oni eniras Okcident-Eŭropon (permare, pervagonaro, peraere, peraŭtomobile), kondukas al tiu teritorio.

Belgujo enhavas pli ol 9 milionoj da enloĝantoj : laŭ denseco (po 290 homoj sur unu km<sup>2</sup>) ĝi estas inter la plej loĝataj landoj de Eŭropo. Tiun popolon konsistigas 2 etnologiaj grupoj : la valona grupo loĝas en la suda landparto (kies limo estas komuna kun Francujo) kaj parolas la francan ; la flandra grupo loĝas norde de limo, iranta de Tournai aŭ Doornik (Henegovio) ĝis Lieĝo, trapasante Bruselon : ĝi parolas la nederlandan lingvon (kiel la nordaj najbaroj, la nederlandanoj). Dume, la ĉefurbo, Bruselo (1 miliono da enloĝantoj) prezentas sintezon (precipe tamen gravan franc-tendencon) de ambaŭ elementoj.

Belgujo estas konstitucia monarĥio parlamenta. La reganta reĝo estas Baŭduino, la unua kun tiu nomo. La popola reprezentantaro kunvenas en la ĉambro de Deputitoj kaj en la Senato. Ekzistas la social-kristana, la socialista, la liberala kaj la komunistaj partioj. La lando konsistas el 9 provincoj. Brabant, en la mezo de la lando, kies ĉefurbo, Bruselo, estas ankaŭ la regna ĉefurbo ; Okcidenta Flandrio (Brugo), Orienta Flandrio (Gento), Antverpeno (Antverpeno), Limburgo (Hasselt), Lieĝo (Lieĝo), Luksemburgo (Arlono), ne konfuzenda kun la Grandduklando ! ; Namuro (Namuro) kaj Henegovio (Mons).

Oni precipe konfesas la katolikismon. Decus nun, memorigi la multegajn kaj diversegajn turismajn allogaĵojn de tiu ĉi lando. Ĝiaj historiaj urboj, plenaj je art-trezoroj, ĝia bela kaj sabloza marbordo, ĝia kulrarto, ĝia pleje perfektigitaj transportiloj, sed precipe la elprovida gastamo de ĝia enloĝantaro faras el ĝi idealan libertempejon !

Venu kaj vizitu Belgion : vi vidos malgrandan landon, sed vi malkovros riĉan naturon kaj interesan popolon.

# EL IE EN LA MONDO

## La lando de dekmiloj da lagoj

Finnlando troviĝas inter la 60-a kaj 70-a latitudoj kaj estas do de nordo al sudo pli ol 1.000 kilometrojn longa. Tial estas nature, ke la vidaĵoj ne ĉie estas similaj. Tamen karakterizaj al la pejzaĝoj preskaŭ ĉie estas arbaroj kaj lagoj. Laŭ nova enciklopedio la nombro de lagoj en la postmilita Finnlando estas 55.000. La esenca lagoregiono ampleksas la mezon de suda landparto. Tie la lagoj formas longajn ĉenojn kaj estas plenaj de insuloj. Tiel formiĝas sennombraj labirintaj akvovojoj, idiliaj por velveturantoj kaj padelantoj.

La plej grandaj lagoj en tiu regiono estas SAIMAA, la centro de orienta lagaro, kies akvo fluas sudoriente al LADOGA, kaj PAIJANNE, la centra-lago de meza lagaro, kies akvo serĉas al si vojon suden al FINNA GOLFO. La centra lago en okcidenta lagaro estas malgranda PYHAJARVI (Sankta Lago), kiu sendas la akvon okcidente al BOTNIA GOLFO.

En norda parto de la lando ekzistas riveroj, el kiuj plej multaj fluas al Botnia Golfo, sed kelkaj al Norda Glacia Oceano kaj Blanka Maro. La plej grandaj lagoj tie estas OULUJARVI kaj INARI.

Vojaĝanto sur landvojoj estas ĉie ĉirkaŭata de virga naturo : arbaroj rokoj kaj montetoj, sur kiuj ordinare ekzistas multege da ŝtonblokoj. Lagoj estas preskaŭ ĉie videblaj. Ĉio estas la produkto de glacia epoko.

Sur la bordoj de lagoj kaj sur deklivoj troviĝas vilaĝoj kaj biendomoj ĉirkaŭataj de grenkampoj. Nuntempe ankaŭ industriaj regionoj kun la kamenujoj de fabrikoj donas multloke stampon al la pejzaĝo. Nur kelkaj ĉefaj vojoj estas kovritaj per asfalto kaj estas relative rektaj, sed la malnovaj, flankaj vojoj, kiuj serpentumas de monteto al monteto, havas nur gruzan makadamon. Aŭtobusa trafiko tamen estas ĉie vigla.

La okcidenta regiono proksima al Botnia Golfo estas ebena, kaj ĝin trafluas multaj riveroj. La plej norda parto de la lando, LAPONIO, havas tute specialan karakteron. Multegaj tundromontoj, kies rondetaĵoj supraj estas senarbaraj, estas ĉie videblaj. Cetere arbaroj etendiĝas preskaŭ ĝis la plej norda pinto de la lando. Inter la tundromontoj ekzistas multloke vastaj, preskaŭ nelogataj marĉoregionoj. Dum la estontaj dek jaroj la pejzaĝoj tie rimarinde aliĝos, ĉar oni konstruos ĉe la branĉoj de Kemi-rivero 7 novajn lagojn, kies areo estos sume 900 km<sup>2</sup>. La lagoj servos kiel akvobasenoj por elektrostacioj kaj donos energion de 1,7 miliardoj da kwh jare. La tuta energio akirota el la akvo de Kemi-rivero estos 5 miliardoj da kwh.

Finnlando estas relative maldense loĝata. En la suda parto loĝas 24 homoj sur km<sup>2</sup>, sed norde nur 4 kaj meznombro en la tuta lando 14 homoj. La nombro de loĝantoj en la lando estas 4,4 milionoj, el kiuj, 8 % estas svedlingvanoj loĝantaj ĉefe en tri regionoj : sur la bordoj de Botnia Golfo kaj Finna Golfo kaj sur la sudokcidenta insularo Alando.

La nombro de urboj estas 42 kaj tiu de vilaĝoj (duonurboj sen plena urba privilegio) estas 25. La ĉefurbo HELSINKI enhavas 440.000 loĝantojn. Nur du aliaj urboj, TURKU kaj TAMPERE enhavas pli ol centmil loĝantojn. Al la sama grandeco apartenis Viipuri, unu el la urboj fordonitaj al Sovetio.

La ĉefa metio de la loĝantaro estas terkulturo, en kiu laboras 42 % el la loĝantaro, sed nuntempe industrio jam donas vivtenon al triono de la popolo. En la ekonomia agado kooperativa movado ludas gravan rolon. Ekzistas preskaŭ 10.000 registritaj kooperativoj, el kiuj ĉirkaŭ duono agas en diversaj branĉoj de terkulturo. Pli fortaj tamen estas konsumkooperativoj, kiuj posedas ankaŭ multajn fabrikojn. Tiuj kooperativoj havis en 1957 pli ol miliono da membroj kaj 8.863 vendejojn. La plej granda kooperativo en la lando estas ELANTO en Helsinko, havanta pli ol 100.000 membrojn. Pri la amplekso de ĝia agado donas bildon ekz. jenaj informoj. La distanco, kiun la aŭtomobilo de Elanto veturas dum unu jaro etendus ĝis la luno kaj reen plus ankoraŭ dekofoje ĉirkaŭ la terglobo, kaj ĝia kolbas-fabrika produktaĵo dum unu jaro preskaŭ 7.000 kilometrojn da malmultekosta kolbaso.

Kiuj finnoj, viroj kaj virinoj, akiris jam en 1906 ĝeneralan voĉdonrajton. La parlamento estas unuĉambra kaj konsistas el 200 membroj. En ĝi la laboristaj kaj burĝaj partioj estas preskaŭ egale fortaj. Pri la socia prizorgado multaj eksterlandaj fakuloj donis laŭdajn eldirojn.

Pri la kulturaj institucioj estu menciataj 4 universitatoj kaj 12 altlernejoj. Krome ekzistas kompreneble diversaj fakaj lernejoj, popolaj altlernejoj, gimnazioj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj. Multaj organizaĵoj subtenataj de la ŝtato zorgas pri la eksterlerneja klerigado.

Kelkaj finnaj poetoj kaj verkistoj estas konataj eksterlande, same kiel kelkaj artistoj kaj komponistoj. El la poetoj la unua ne venkita estis J.-L. Runeberg, kiu vivis en la pasinta jarcento kaj verkis svedlingve. El la verkistoj la unuan rangon akiris post sia morto Aleksis Kivi, kies ĉefa romano kaj kelkaj teatraĵoj aperis ankaŭ en Esperanto. El la nuntempaj verkistoj la plej konataj estas E.F. Sillanpaa, Mika Valtari. Post la milito famiĝis per sia romano « Nekonata soldato » laboristdevena verkisto Vaino Linna.

Inter la artistoj Akseli Gallen-Kallela kaj inter la komponistoj Jean Sibelius estas la plej unue

menciindaj. Ankaŭ finnaj sciencistoj alportis sian kontribuon al la scienca akirajo. Samideano, profesoro Yrjö Vaisala faris gravajn astronomiajn observojn kaj konstruis sciencajn instrumentojn, kaj la prezidanto de Finna Scienca Akademio A. I. Virtanen estas fama biokemiisto.

Por la naturamikoj kaj turistoj, kiuj ŝatas virgan naturon, Finnlando estas idilia turista lando. La hoteloj ne ĉiŝluka povas konkuri pri lukso kun la hoteloj de pli centraj landoj, sed simplaj kaj puraj tranoktejoj posedataj de Finna Turista Societo kaj aliaj troviĝas ĉie en la lando, eĉ en fora Laponio. Kaj pli ol cent delegitoj de UEA loĝantaj en 60 lokoj donas sian helpon al vojaĝantaj esperantistoj.

Hannes KOIVU.



## Teodoro HERZL

### iniciatinto de la Juda

#### Ŝtato Israeli

(Resumo de prelego,  
farita en Grésillon en somero 1959)



Al la multaj libroj, eldonitaj en la epoko inter la du mondmilitoj de la aktiva entrepreno. **Literatura Mondo** en Budapeŝto, apartenas unu, bedaŭrinde tro malmulte atentita de la tiutempaj gesamideanoj, nome la libro **La Juda Ŝtato**, verkita de Dro Teodoro Herzl kaj tradukita en Esperanton de Bernard Selzer, kun antaŭparolo de Dro Emil Pfeiffer.

**La Juda Ŝtato** estas verko, kiu vekis larĝan intereson ĉe sia apero en 1896, poste malaktualigis dum jardekoj kaj pli poste denove aperis en la centro de intereso pro la fonda de la sendependa juda ŝtato **Israeli**.

Kiuj estis ĝia aŭtoro kaj kio estis lia celo? Jen du demandoj respondendaj.

Teodoro Herzl estis judo, naskita en 1860 en Budapeŝto. Oni nomas lin la patro de **cionismo** aŭ de la cionista movado, la strebado de la judoj al la lando de la prapatroj : **Ciono**, la nuna Israeli, aŭ Palestino, kiel oni kutimis diri antaŭ 1940.

Herzl studis juron en Vieno, kie li doktoriĝis. Sed la migremo de lia raso ne donis al li ripozon kaj pro tio li fariĝis ĵurnalisto. Kiel raportisto de Neue Freie Presse (= la nova libera gazeto) li venis Parizon, el kiu urbo li raportis pri la agado de la franca parlamento en Palaco Bourbon. Li havis multan sukceson, ankaŭ kiel aŭtoro de teatraĵoj, ĝis... ĝis eksplodis la kontraŭ-judismo (= antisemitismo) en Francujo sub la formo de la afero Dreyfuss.

Tiu ĉi fifama proceso emocie skuis Herzl-on kaj li komprenis, ke eĉ en libera okcidenta Eŭropo la judoj ne estas tute sekuraj. En orienteŭropaj landoj la persekutado de judoj estis pli ofta en la lasta duono de la dekaŭa jarcento. Oni legu nur la biografion pri doktoro Zamenhof (verkita de Ed. Privat) por ĝuste kompreni la signifon de « pogromo ».

Nun subite Herzl komprenis sian vivocelon, sian vokitecon. Li montru al la judaro tutmonda, al sia popolo, la iratan vojon, la revenon al la tero de la prapatroj : Palestino, Ciono, aŭ kiel oni nun diras : Israeli. Febre li ekverkis kaj la rezulto de tiu obseco aperis en germana lingvo en 1896, nome la libro **Dur Judenstaat, La Juda Ŝtato**.

En tiu libro Teodoro Herzl disvolvas la tutan projekton pri reveno de la dispelitaj judoj al sia propra ŝtato. Li skizas la organizon de tiu ĉi ŝtato, la farendan laboron, sed ankaŭ la manieron de tiu amasa elmigro kaj la vojon, laŭ kiu la juda posedo en la diversaj landoj estu likvidata.

Kiel ĉiu idealo ankaŭ la revo de Herzl ne estis tuj realigebla, ĉar... Palestino ne estis libera lando, sed lando en la mano de la turka sultano.

Herzl nun ekmigris tra la mondo kvazaŭ apostolo. Li vizitis la ĉefurbojn eŭropajn, la tiutempajn altrangulojn. Pluraj restis skeptikaj, aliaj rikanis. Vilhelmo la Dua, glora imperiestro de Germanujo, amiko de la Turkoj, promesis sian helpon, sed li faris nenion. Eĉ judoj kontraŭagis ! Spite ĉio ĉi la internacia cionista movado ekruliĝis kaj okazigis sian unuan internacian kongreson en Baselo, Svislando.

Jen por la unua fojo en la historio, la dispelitaj judoj kunvenis. Post dumil jaroj rekolektiĝis israelidoj kaj aŭskultis la emocitan voĉon de sia nova profeto : Teodoro Herzl. Kiam poste montriĝis, ke la afero ne iros tiel glate kiel deziris nia heroo kaj liaj fidelaj adeptoj, Herzl estis preta akcepti kompromison. Post penoplenaj intertraktoj kun la angloj li interkonsentis pri kolonizado en Uganda, meza Afriko.

Ho, ve ! Tiu kompromiso alten blovis la ondojn en la facile ekflamantaj koroj de pasiaj judoj. La reveninta aspiro al reveno en Palestinon estis por multaj judoj afero ankoraŭ pli mistika ol reale praktika. Tial, en nova cionista kongreso oni insultis Herzl-on « afrikano », « perfidulo ».

La levinta ventego estis tro forta por la korpe jam kadukiĝinta profeto. Reveninte de tiu sesa cionista kongreso li retriris sin, malsaniĝis kaj mortis... nur 44-jara. En Vieno oni entombigis lin. Sed 45 jarojn poste, en Aŭgusto 1949, oni plenumis lian lastan deziron : lia cindro estis transportata al Israeli kaj nun ripozas en la tero de la prapatroj ? La maŭzoleo sur la Herzl-monto apud Jeruzalemo estas la pilgrimejo, la sanktejo por ĉiu moderna judo.

Herzl mortis miskomprenita. Granda, senlima mato da sango kaj da homa suferado estis necesa antaŭ ol la mondo maturiĝis por lia ideo : propra hejmo por ĉiu judo : unuvorte **Israeli**, ŝtato sendependa.

M. DE WAARD.

# TURISMO

## BRETONIO VIN VOKAS ! (1)

**ANTAUPAROLO.** — La hodiaŭ komencantan serion de artikoloj pri Bretonio mi skribis laŭ la bona verko de Ch. Le Seach, UEA delegito, kiu bedaŭrinde ne plu vivas nun. Li skribis por « Ora Ulesko », informas kaj kultura bulteno de okcidentfrancaj esperantistoj. Granda estas mia ŝuldo al S-ro Le Seach kaj al aliaj esperantistoj, kies artikoloj aperis en « Ora Ulesko ».

R. MARTIN, agregacia profesoro.

### GEOGRAFIJAJ KAJ TURISMAJ INFORMOJ


Bretonio, la plej okcidenta franca provinco, estas malnova lando. Tion atestas ties tre tranĉita marbordo, ties malnovaj montoj, restaĵoj de iam pli altaj montoj, kies primara subtero konsistas el granitoj, skistoj kaj grejso. Erikoj, filikoj, uleskoj estas la ĉefaj kreskaĵoj naturaj. Bretonio ofertas duoblan aspekton : unue la marbordo, ofte rokeca kaj multe tranĉita, kun siaj « aber'oj » en norda Finistero (Aber Benoit, Aber Ildut, Aber Vrah) ; due, la interna parto de la provinco, nomata Arcoat, t.e. la arbarlando.

En Bretonio, la tajdo estas tre forta. En la regiono de Sta. Malo, la alfluo estas la plej alta el la tuta mondo. La niveldiferenco estas 14 m. dum ses horoj kaj estas perceptebla ĝis 30 km. interne. Multnombraj rokoj kaj insuloj ĉirkaŭas Bretonion. La ĉefaj el tiuj insuloj estas : Brehat, Batz, Ouessant, Sein, Groix, Bela Insulo kaj la insuletoj de Morbihana Golfo (Insulo de la Monaĥoj, Arz, ktp.)

Turisto, kiu vizitas Bretonion miras pri la granda kvanto da pomarboj, kiujn li renkontas, ĉefe en departementoj « Ille et Vilaine » kaj « Finistère », kaj li emas gustumi la bongustan cidron. Ankaŭ tre plaĉas al li la bonegaj lakto kaj butero produktataj de multegaj bovinoj, kiuj paŝtiĝas sur la herboriĉaj kampoj.

Se tiu turista vojaĝos sur la marbordoj, li povos manĝi multspecajn fiŝojn kaj krustulojn kapitaĵajn de la bretoniaj matfiŝkaptistoj. Ni ne povas preterlasi la frumatarojn el la marbordaj regionoj : terpomojn, florbaskojn, artišokojn, bulbojn, pizojn, fragojn, ktp. Ili estas konsumataj ne nur de tuta Francio, sed ankaŭ de la eksterlando. Oni povas trovi konservaj-fabrikejojn en la ĉefaj Finisteraj kaj Morbihanaj havenoj. Krome, en Finistero oni bredas multajn ĉevalojn. Dum la jaro 1950, la fervojstacio de Landivisiaŭ ekspedis 18.000 ĉevalojn.

Du grandaj kaj mondumaj strandoj altiras a. riĉajn somerumantojn en Bretonion, nome Dinard kaj La Baule. Aliaj iom malpli luksaj, sed tamen sufiĉe bonaj arigas ankaŭ multajn turistojn : Parame, S-ta Malo, S-ta Cast, Erquy, S-ta Quay-Portrieux, Perros-Guirec, Tregastel sur la norda bordo; Le Conquet, Camaret, Morgat sur la okcidenta; Locudy, Benodet, Beg-Meil, Le Pouldu, Quiberon,



Carnac, Lockmariaker, Port-Navalo, Le Croisic sur la suda bordo. Inter tiuj supre-mencitaj troviĝas multaj aliaj strandoj malpli kostaj, senluksaj, kie simplaj homoj povas pasiĝi agrablajn feriojn kun siaj amikoj.

La turisto, kiu preferas restadi aŭ migradi tra la interna lando povas ĝui la belan kamparon aŭ elekti restadejon en la mult-nombraj antikve ravaj urboj aŭ urbetoj de la bretonia internlando. Cetere, li neniam estos fore de la maro kaj preskaŭ ĉiam trovos riveron aŭ lageton tute proksime, kie li povos sin bani aŭ fiŝkapti. Jen estas la ĉefaj lokoj : en la departemento « Ille et Vilaine » : Fougères, Vitre, Dol, Paimpont, ktp. ; en la departemento « Côtes-du-Nord » : Dinan, Lamballe, Carrel (ĉe la lago de Gerledan), S-ta Brieuc, Lannion, ktp. ; en la departemento « Finistère » : Morlaix, S-ta Thegonnec, Lampaul (regiono de la paroĥaj ĉirkaŭfermitaĵoj), Le Huelgoat, meze de sia bela arbaro, Sizun, Le Faou, Crozon, Quimper, Pont-Aven kun siaj muzeistinoj, siaj belaj kostumoj, sia « arbareto de Amo » ; en la departemento « Morbihan » : Pontivy, Josselin, Ploermel, Auray, Vannes, ktp. Preskaŭ ĉie en Bretonio oni povas bone tendumi. En Quimper la « Service Departemental de la Jeunesse et des Sports », B.P. 57, disdonas senpage liston de la Finisteraj tendejoj.

Aliaj inform-oficejoj estas :

**Vannes** : 29, rue Thiers ; **Brest** : Cité commerciale ; **Quimper** : 1, Place du Champs de Mars ; **Rennes** : 7, Quai Châteaubriand ; **Nantes** : Châteaudeau des Ducs de Bretagne.


(daŭrigota).  
R. MARTIN.

1) Aber'o estas profunda elfluo (bretona lingvo).

2) la « paroĥaj ĉirkaŭfermitaĵoj » ĉirkaŭas la preĝejojn ; ili konsistas el : kalvario, triumfarko, oŝtejo kaj tombejoj. La tuto estas ĉirkaŭmurita. Vere vizitindaj arkitekturaj tutaj !

# ANJOU

« Anjou estas malnova provinco en okcidenta Francujo. Ĝi nun entenas la tutan departementon Maine et Loire kaj partojn de la departementoj Sarthe, Mayenne kaj Indre et Loire. Ĝi konsistas el tri geografiaj partoj : la Valo (rivero Loire), la Boskolando (nord okcidenta kaj sud okcidenta partoj), la Ebenajo (orienta parto). La ĉefa urbo estas Angers. La vinoj de Anjou estas fame konataj : ilin produktas la vitejoj kuŝantaj sur la montetoj starantaj ĉiufanke de la rivero Loire kaj de la rivereto Layon ».



Tiujn vortojn vi legas en iu ajn enciklopedio. Iu ajn juna Franco tion scias. Sed ni ne estas geografiistoj. Por ni kiuj bone konas ĝin, Anjou estas, antaŭ ĉio, lando de dolĉeco. Dolĉa estas la klimato pro la fakto ke la rivero Loire alportas la mildajn ventojn de la atlantika oceano. Dolĉaj estas la pejzaĝoj kuŝantaj en sunlumo ne tro akra. Simpatiaj estas la Anjou-anoj.

Kiam turisto venas al Anjou, li veturas laŭ larĝaj vojoj borderitaj sur ambaŭ flanko de altaj arboj, kiuj modifas la scenejon laŭ la sezono. Kiam li vizitas Anjou li plezurege laŭiras la serpentinajn vojetojn, kiuj subite malkovras belan valeton, aŭ grandan bienon meze de kiu staras fiera kastelo. Sekvante la valojn de la Loire kaj de Layon, li preterpasas la vitejojn, kies vicoj de bone zorgitaj vitoj promesas ĝojon al ĉiuj.

La plej granda urbo estas Angers, la urbo de la floroj. Ĉiam pligrandiganta, Angers kuŝas de la loko, kie tiu rivero enfluas en la Loire. La

**St-Denis de Pontigné.** — Unu el la plej belaj preĝejoj de Anjou (XIIa-XIIIa jarcentoj). Ĝia sonorilejo estas spirala. Interne oni povas vidi belajn mur-pentraĵojn. Ĝi situas nur 5 km. de la Esperantista Kulturdomo.

vizitindaĵoj ne mankas en Angers : la impona kastelo kun siaj 17 turoj tre altaj, kiu estis konstruita en la XIII-a jarcento, kaj entenas belegajn tapetojn de la 14-a jarcento ; la katedralo de la XII-a kaj XIII-a jarcentoj kun du sonorilejoj 75-metrojn altaj ; la multaj malnovaj konstruaĵoj el kiuj la renesanca Hotel Pincé kaj la tre kurioza XV-a jarcenta Domo de Adamo ; fine la parkoj kaj bulvaroj, paradizo de la floroj.

Dua urbo estas Saumur, sur la rivero Loire. Parte detruita dum la lasta mondmilito, tiu urbo estis rekonstruita laŭ Anjou-a stilo. Pontoj transaltas la tri branĉojn de la rivero. La fiera kastelo alte superstaras la urbon, kiu entenas ankaŭ belajn malnovajn preĝejojn kaj konstruaĵojn.

La vizitindaj kasteloj, preĝejoj kaj abatetoj estas multaj en Anjou : la kasteloj de Brissac, Plessis-Bourré, Montsoreau, Boumois, Montgeofroy, Montreuil Bellay, Plessis-Macé, Serrant, Durtal ; la preĝejoj de Cunaud, Pontigné, Trèves ; la abatejo de Fontevrault. Ĉiuj tiuj konstruaĵoj estas diversstilaj sed same belegaj.

La apero de la vitoj en Anjou datumas de la Romanoj. La monaĥoj ilin kreskigis cirkaŭ siaj monaĥejoj ĉar la vino estas liturgia trinkaĵo. Tre rapide tiu kultivado disvastiĝis kaj plengigis la ...impoŝto-kolektantojn. Naskite de la neceso konigi la Anjou-ajn vinojn, la « Confrérie des Chevaliers du Sacavin » (Kunfrataro de la Kavaliroj de Vinsako), kunigas fervorajn discipolojn de la Anjou-a vino. Multaj tre konataj franĉoj kaj eksterlandanoj apartenas al tiu kunfrataro kaj



**Coiffes.** — Ĉiujare okazas la « Kunveno de la Anjou-aj kufoj », dum kiu la diversaj folkloraj grupoj prezentas dancojn kaj kantojn.


ceremonioj kunvenigas ilin vestitajn per pitoreskaj kostumoj.



Kiam oni parolas pri Anjou-a gastronomio oni tuj pensas pri fiŝoj. Tre diversaj ili estas en la riveroj kaj lagoj : karpoj, perkoj, tinkoj, bramoj, gobioj, barbfiiŝoj kaj angiloj. Sed la reĝo de la fiŝoj estas la ezoko, kiu permesas al la kuiristinoj prepari la multŝatatan, ege bongustan « blanka butero »-n, saŭcon el vinagro, askalonoj, butero kaj... hereda maniero.

Plej trafe finos tiun « vojaĝon » tra Anjou teksto de Sro Joulain, aperinta en la bela revuo de la Iniciativa Sindikato de Anjou, « Le Pays d'Anjou » :

« Aŭskultu vojaĝantoj, fratoj miaj, kiuj, venontan someron, trapasos Anjou. Ĉu vi venos de Oriento, irante la vojon de la invadintoj ? Tiu estas la reĝa Loire-vojo, kies mejloŝtonoj estas kasteloj. Ĉu vi venos de la Sudo tra la malnova laŭ la majesta vojo de Nantes, larĝa kaj brila Saumur-regiono ? Ĉu vi eniros kun la mara vento kiel aŭtovojo ? Ĉu vi venos de Parizo meze de la



**Le Plessis-Macé.** — Tiu kastelo akceptis Ludovikon la Xian kaj Franciskon la Ian. La ĉambroj entenas belan meblaron.

abioj de la Baugé-regiono? aŭ de Rennes meze de la kverkoj de Segré? De kie ajn vi venas, mi petegas, ke vi ne estu nur preterpasantoj, ke vi sciu malrapidi kaj eĉ halti. Se vi opinias, ke la Anjou-a folkloro indas viziton, vi ĝin trovos malproksime de la vojoj, en la mezo de simplaj pejzaĝoj.


« En fora loko, en la sekreta parto de la malnova lando, malproksime de la domoj kaj de

la homoj, ekiras vojeto inter la kampoj, la vitejoj, la arbaretoj aŭ la herbejoj : ĉar vi ne scias kien ĝi iras, ĉar la tuta plezuro kuŝas en la nekonco, vi sekvas ĝin. Ĉe la fino, eble frontas vin la elreviĝo, sed pli ofte rekompenco : malnova senhoma muelejo kiu ebligas la revojn ; la Loire, en la malproksimo, same kiel kurba glavo el brila ŝtalo forgesita sur la ebenajo ; sonorilejoj blankaj kiel lumturoj...

« Aŭ en la lando de la heĝoj, la interkruta vojeto, turniĝas ĉe malnova kruco, en kies ombro leviĝas la memoro de la milito de la Gigantoj.



« Aŭ en la lando de la altaj arboj, la vojo alvenas al arbara vojkruciĝo, ĉe dolemno rigardanta orienten, ĉe ŝtonego staranta kiel fingro postulanta silenton. Cu vi aŭdas la bruon de la falĉileto de la druidoj falanta sur la visko-tufojn? Kaj tie en la malproksimo,



**Baumoiss.** — Tiu kastelo staras apud Saumur. Ĝi datumas de la komenco de la Renesanco.

sur la romana vojo, ĉu ne estas la bruo de la marŝantaj legioj? Ne, nur estas la vento, kiu blovas en la orgentubojn de la pinoj ; ĉi tie vi staras en soleco, en la eterna folkloro mem, for

de la motoroj kaj faj fajfilegoj ; ĉi tie vi kapablas aŭdi la grandan voĉon de la Anjou-a legendo ; nur aŭskultu ĉirkaŭ vi, kaj en vi mem, la kanton de la silento. »



# GRAMATIKAJ RESPONDOJ

En kursoj, kiam la novaj esperantistoj estas finlernintaj la elementojn de la esperanta gramatiko, ofte okazas, ke iu faras la jenan demandon : « Kiu estas la signifo de « end » ? Kiu estas la diferenco inter « ind » kaj « ot » ? »

Ni unue vidos la diferencon inter « ind » kaj « ot ». Kion signifas ĉiu el tiuj sufiksoj ?

**IND** : en la Plena Vortaro oni legas : « sufikso esprimanta, ke io aŭ iu prezentas sufiĉajn kondiĉojn, por ke oni direktu al ĝi aŭ li la agon esprimatan de la radiklo. » Do ĝi korespondas al : « kiu meritas esti... aŭ kiu meritas, ke oni... u al (pri, pro), ĝi (li) ».

**OT** : pasiva sufikso, kiu montras, ke oni direktos al iu aŭ io la agon esprimatan de la radiklo. Ĝi entenas ideon pri estonto.

La diferenco estas malgranda kaj, kelkafoje, « ind » kaj « ot » esprimas ideon pri devigo. Sed ni povas resumi tiun diferencon dirante ke oni uzu :

« ind » kiam ni deziras esprimi meriton ; vizitinda kastelo estas, kastelo, kiu meritas, ke oni vizitu ĝin (oni ne esprimas, ke oni devas ĝin viziti).

« ot » kiam oni deziras esprimi, ke estas dezirinde, ke io aŭ iu suferu agon, post pli malpli longa tempo.


Kompreneble oni povas konsideri, ke laboro farota estas ankaŭ farinda !

Fine, kiam oni deziras insisti pri ideo de **nepra devigo** oni uzu la sufikson « end » ;

tiu laboro estas farenda : oni **nepre** devas ĝin fari.



Tiu virino estas ridinda  
(ŝi meritas, ke oni ridu pri ŝi)



La laboro farota estas pli granda  
ol la laboro farita  
(neniu ideo pri devigo, tamen... !)



Tiu pantalone estas flikenda  
(oni nepre devas ĝin fliki !)

## LIBERO KAJ OBEO

Mi ne pensas nun pri libero kaj obeo en religio, socio aŭ politiko, sed rilate al vortoj kaj frazoj, al lingvo : parolado kaj literaturo. Ĉu mi, vi, ili havas liberon esprimi per originalaj lingveroj aŭ devas obei, uzi la lernitajn aŭ registritajn en lernolibroj kaj vortaroj ?

Eĉ lernante fremdan nacian lingvon, ofte oni havas la falsan ideon ke oni povas fari, kunmeti frazojn laŭ vortoj kaj gramatikaj reguloj. Kaj ekze hispanoj kaj angloj laŭ tia lernado de franca lingvo salutis per **comment êtes vous — como estas usted — how are you.** Kaj en Esperanto : kiel vi estas. Anstataŭ respektive, per **comment vous portez-vous kaj kiel vi fartas.** Italoj kaj germano dirus **kiel iras al vi — como le va, wie geht es Ihnen** — Tio signifas ke oni devas lerni precipe frazojn, ĉar en ili estas

samtempe la gramatiko kaj la vortoj vivantaj, la sintakso kaj la semantiko.

Neniu granda lingvo ekzistas, se ĉiuj oratoroj kaj verkistoj estus kredintaj ke ili devis obei la estintojn kaj ne havis liberon esprimi laŭbezone, laŭ imperativo de la sentoj kaj pensoj, ke ili devis resti en la limoj de la antaŭa esprimado. Sed nur speciale naturdotitaj lingvuloj povas kreadi : la aliaj povas nur fuŝi, se ili volas krei ; ili povas, devas, nur obei, nur imiti.

Zamenhof malfermis multajn pordojn al la libero post sia strikta Fundamento ; li montris al kreokapablaj la vojon kreadi, li komprenigis ke la Fundamento estas bazo por natura lingvo kaj ne simpla kodo. Li ne estus uzinta **dank'al** kaj multajn

neologismojn kaj kelkajn idiotismojn, se li ne penis aŭ sentis ke vivanta lingvo bezonas tian eblecon.

La eminenta verkisto Joaquim Ruysa, plej ŝatata stilisto de la moderna kataluna literaturo, lernis Esperanton antaŭ 50 jaroj, sed ne ĝis la intenco vidi tian Zamenhofan liberigon, kaj li opinis ke nia internacia lingvo ne estis sufiĉe elasta, riĉigebla por ĉia esprimado. Jen kion ni devas komprenigi al verkistoj.

Do, kara leganto, se ni ne profunde lernis Esperanton, se ni ankoraŭ ne sentas ĝian spiriton lingvan, kaj se ni ne estas ankau poetoj, ni devas obei, uzi la oficialan lingvon, la ĵan kreitajn lingverojn, kiuj feliĉe estas nun supersufiĉaj por nia bezono-se ni ilin lernis! - Ni devas obei.

Delfi Dalmaŭ.

## - Tra la Esperanta Literaturo -

### UNUJ PASOJ : ANTONI GRABOWSKI

Antoni Grabowski naskiĝis en Nowe Dobre (Pomeranio) la 11an de Junio 1857. Ingeniero, li post laborado en kelkaj polaj urboj, ekloĝis en Varsovio. Li ekkonis Volapukon kaj vizitis Pastron Schleyer. Sed li esperantiĝis en 1887 kaj, je la sama jaro, inter Zamenhof kaj li okazis la unua esperanta konversacio. Granda poligloto li posedis pli malpli 30 lingvojn. Li vigle partoprenis la esperantan movadon kaj fariĝis Prezidanto de la Pola societo ĝis la fino de sia vivo. Dum la unua mondmilito, kiel germano, li devis forlasi Varsovon. Reveninte hejmen dum la germana okupacio li retrovis sian domon malplena : liaj familianoj formigris Rusujon.

Tiam li dediĉis sian vivon al esperanta traduko. Li komencis kaj finis la tradukon de « Sinjoro Tadeo ». Post la morto de Zamenhof, li iĝis tre soleka kaj pli turmentis lin kormalsono. Li subite mortis antaŭ la montrofenestro de esperanta librovendejo, en Varsovio, la 4an de Julia 1921.

Grabowski skribis ne multajn originalaĵojn. Ni nur citu kiel prozaĵon : « La Kondukanto » (1888), unu el la unuaj esperantaĵoj sen nacia traduko. La celon de tiu libro Grabowski nenam donas al ni en la antaŭparolo :

« Doninte frazojn la plej uzatajn, montrinte, kiel oni faras vizitojn internaciajn, kiel oni dormas, promenas, manĝas, trinkas, vojiras, amas internacie kaj edziĝas, mi fine eĉ kondukas la legantojn en Cielon kaj Inferon de la malnovaj Grekoj, kiujn mi iĝas ankau paroli nian lingvon. »

Kiel poeziaĵo originala ni citu « La Tagiĝo », kiu fariĝis la dua esperantista himno.

Sed pli konata estas liaj tradukaĵoj. « La Neĝa Blovado » de Puŝkin, « La Gefratoj » de Goethe, « Janko Muzikanto » de Sienkiewicz, kaj ĉefe « El Parnaso de Popoloj » (poemtradukoj el 30 lingvoj, kaj « Sinjoro Tadeo » de Mickiewicz.

Pri « Sinjoro Tadeo » Edmond Privat, en « Historio de la lingvo Esperanto » diras : « La versoj estas nekompareble pli proksimaj al la originalo en la Esperanta traduko de Grabowski ol en iu frazo aŭ angla provo. Vortordo kaj ritmo estas respektitaj ofte kun impresa efiko. »

G. J. Degenkamp en sia libro « Esperanto 60-jara » diras : « Grabowski estis la unua, kiu donis fortan puŝon al plejeble vasta eluzado de la eblaj,

kiujn prezentas la Esperanta gramatiko super ĉiuj aliaj lingvoj. Li estis la « modernulo » inter la klasikuloj kaj liaj lingvaj eksperimentoj kreis la bazon por posta pli ekzakta ellaboro de la gramatiko. Lia unua traduko « La Neĝa Blovado » estas speciale rimarkinda pro tio, ke konserviĝis en ĝi la primitiva, kvazaŭ hezita moviĝo sur kampo ankoraŭ tre nova, sed dume ĵen kaj ĵen montriĝis en ĝi la ĝermoj de posta evoluo. »

Jen elĉerpajo el « La Neĝa Blovado ». Pri tiu traduko Grabowski skribis en la antaŭparolo de la dua eldono : « Aliaj samideanoj eble interesiĝos ekvidi, kiaj estis la infanaj kaj knabaj jaroj de la nuna viriganta Esperanto. »

« Mario Gravitovna longe ŝanceliĝadis ; multaj projektoj de l'forkuro estis forĵetitaj. Fine ŝi konsentis : en certigita tago ŝi devis ne vespermanĝi, sed forigi en sian cambron el la ŝajnkaŭzo de l'doloro je l'kapo. Sia servanta knabino estis en la komploto ; ili du devis eliri en la gardenon trans la posta balkona ŝtuparo, trovi pretigitan glitveturilon, sidigi sin en ĝi kaj veturi ĉirkaŭ kvin verstojn de Nenaradovo, en la vilaĝo Jadrino, rekte antaŭ la preĝejo, kie Vladimiro jam devis ilin atendi. Antaŭ la decidanta tago Mario Gravitovna ne dormis tutan la nokton ; ŝi ordadis kaj kunligadis sian tolaĵon kaj vestaĵon, skribis longan leteron al unu sentema fraŭlino, sia amikino, alian al siaj gepatroj. Ŝi diris adiaŭ al ili en la plej kortuŝantaj vortoj, senkulpegis sian eraron per la nevenkebla forto de la ama sento kaj finis per tio, ke la plej feliĉa minuto de l'vivo estos por ŝi tiu, kiam estos permesita al ŝi ĵeti sin al piedo de la plej karaĵ gepatroj. Sigelinte la du leterojn per Tula sigello, sur kiu estis elformitaj du brulantaj koroj kun konvena surskribo, ŝi ĵetis sin sur la litan mallonge antaŭ la lumigado de l'tago, kaj ekdormetis ; sed ankau tie ŝi teruraj ŝonĝaj fantazioj ĉiunute sin vekadis. Jen ekŝajnis al ŝi, ke en tiu sama minuto, kiam ŝidiĝis en la glitveturilon por veturi al la edziĝo, la patro ŝin ekhaltis, kun turmenta rapideco ŝin trenis sur la neĝo kaj ĵetis en malluman kaj senfundan subteraĵon... kaj ŝin flugis malsupren kun neklarigebla mortigado de l'koro... ĵen ŝi vidis Vladimiron, kuŝantan sur la herbo, palan kaj sangantan. Mortante, li petegis sin per voĉo irante tra l'koro, ke ŝi rapidu por lin edziĝi... Aliaj malbelaj sencenaj ŝonĝaj vidaĵoj sin portis antaŭ ŝi unu post la alia. Fine ŝi levis sin el la lito, pli pala ol kutime, kaj kun nepreteksita doloro je l'koleo. La patro kaj patrino ekvidis ŝian maltrankvilecon ; ilia karesa zorgado kaj la sencenaj demandoj de « Kio estas al vi Manjo ? Cu vi ne estas malsana Manjo ? » disŝiradis al ŝi la koron. Ŝi penis ilin trankviligi, montri sin goja, kaj ne povis. »

# POR VIA DISTRO



## Nia Konkurso

3-a parto

### UNUA TEKSTO

(Por 2 poentoj por ĉiu eraro korektita)

Bonvolu korekti la gramatikajn erarojn en la ĉi suba teksto :

« Jonathan Swift kaj la servanto — La glora aŭtoro de la « Vojaĝoj de Gulivero » estis granda amanto de pleŭronektoj (specoj de fiŝoj). Tio ĉi estis lian adoranton kaj bonfarananton, lordon Temple kiu ofte sendadis al li grandajn fiŝojn de tiu ĉi speco. La satiristo ĉiam kun piezuro ilin akceptadis, sed al la alportanta servanto li neniam donadis trinkmono. Tion ĉi kolerigis la servanto, kaj, kiam li unu fojo denove devis iri al Swift, por alporti al li grandan pleŭronekton ; li montris sian nekonsentecon iom maldelkate. Tuj Swift levigis, sidigis la servanton sur sian seĝon kaj diris : « Mia amiko, vi ne scias, kiel oni devas plenumi komision : mi montras ĝin al vi. » Swift prenis la pleŭronekton kaj alpaŝis malrapide kaj respektige al la servanto. « Mia sinjoro, li diris, salutis vin kaj petas vin, sinjoro Dekano, akcepti tiun ĉi malgrandan donacon ». Nun la servanto sin levis kaj respondis : « Mi petas tre kore danki vian sinjoron. » Kun tiuj ĉi vortoj li metis la manon en la poŝo, eltiris duonon da krono kaj premis ĝin al Jonathan Swift en la mano. « Brave ekkliris tiu ĉi, vi estas pli saĝa ol mi pensis. Mi rimarkos al mi la instruon kaj jam pli ne forgesos pri la trinkmono. »

#### GELEGANTOJ

Ni ŝatas viajn aprobojn

Ni multe ŝatas viajn abonojn

### DUA TEKSTO : ENIGMO

(ankaŭ solvota de la partoprenantoj al la konkurso)

#### Kioma horo estis ?

Grupeto da esperantistaj naturamikoj dum la lasta somero faris libertempan ekskurson. Post tuta taga laciĝa marŝado ili haltis ĉe bela kampeto inter rivereto kaj arbareto, kaj decidis tranokti tie. Ili starigis siajn tendojn, aŭskultis per sia portebla radio-aparato la Esperanto-lingvan elsendon de la Itala radio kaj post nemultaj minutoj jam dormegis.

Dum la nokto, nigra kiel fulgo, ĉar dika nubo kovris la ĉielon, unu el la junuloj vekigis kaj volis ekscii kioma horo estas. La poŝhorloĝo kuŝis en distanco, sur lia dorsosako. Li povis vidi ĝin, ĉar la strekoj de la horoj kaj minutoj, kaj same de la du montriloj, estis lumantaj. Sed la ciferoj mem ne estis lumantaj kaj tial li ne povis vidi, ĉu la horloĝo kuŝas rekte aŭ oblikve. La junulo estis tro maldiliganta por tiri la manon el la varma dormosako kaj fari lumon aŭ palpi la horloĝon. Tial li klopodis eltrovi la tempon laŭ la pozicio de la montriloj. Li klare vidis, ke ambaŭ montriloj staras precize sur streko, kaj ke inter la du montriloj lumas ankoraŭ kvin strekoj. « Nun mi devas elalkuli la tempon », diris al si la junulo, kaj li komencis cerbumi.

Cu vi povas diri la tempon ? (20 poentoj.)

**ATENTU.** — Tiun duan tekston (enigmon) ankaŭ devas solvi la partoprenantoj al la konkurso. Nepre legu la regularon jam publikigitan en antaŭa numero de la revuo. Ni tamen konsentos prokrasti la datojn fiksitaĵojn por la respondoj, por la abonantoj malproksimaj aŭ por tiuj kiuj estos ricevintaj la revuon malfrue.

Le Gérant : H. MICARD

IMP. COCONNIER, SABLÉ



Por fini la  
tagon, iom  
da pilkludo



« promena-  
do » tra la  
herbejoj..



... ĝis la  
dolmeno.



Finfine la  
ripozejo  
aperas



Steleto en-  
dormiĝas.  
Li sonĝas,  
ke ĉiuj es-  
perantistoj  
estas saĝaj  
kaj vizitas  
Gresillon!

## FANTAZIAĴOJ

### La Familia Artifiko

Mi neniam intencis pretendi, ke la fraŭleco ne enhavas mil pro-  
prajn oportunaĵoj, kies nomaro estus tro longa. Sed ekster tiuj profitoj,  
kiom da neeviteblaj mizeretoj, kiom da moraj malsuperaĵoj, kiom da  
konsternantaj ĉagrenoj! Diru, kion vi volos : estas tamen cent heroaĵoj  
nefareblaj por fraŭlo, kiuj estas nur bagateloj por familio.

Antaŭ kelkaj tagoj, mi estis apud vera komedieto, kiu min tute  
ravis, kaj kiu — ĉu mi konfesos tion? — min perforte instigis edziĝi  
kaj idojn krei.

Alveninte iom malfrue : mi trovis la vagonaron plene okupita.  
Ĉar mia vojaĝo estos iom longa, mia nazo fariĝis ankoraŭ pli longa,  
je la ideo, ke neniam restas plu bona angulo. Baldaŭ mia atento estis  
altitita al du junaj infanoj, knabo kaj knabino, bruegantaj per trump-  
petoj ĉe la porde de vagono? Starante malantaŭ tiuj ĉi, virino, kun  
la brusto tro malkovrita, mamnutris novan naskiton, kiu plorkriis kiel  
diablot. Sinjoro, la patro videble, kaj same la edzo, sidis ĉe la kontraŭa  
flanko, fumante pipon, sed tiamaniere ke li ĵaluzis la lokomotivon. Mi  
ne ŝanceliĝis unu minuto, tiel multe estis al mi plaĉanta tiu ĉi beleta  
familia sceno. Mi tuj eniris.

Se mi dirus, ke oni akceptis min per unuanima rideto, mi certe  
dirus trograndigon. Mia alveno kontraŭe kaŭzis sur ĉiuj vizagoj mal-  
belagan grimacon de malkontentigo.

Post signalo de la fajfilo ĝen ni foriras? Tiam ŝanĝo subita.  
La patro remetas sian pipon en sian pipulon. La patrino revestas per  
tolaĵoj la infaneton, kiun ŝi zorge kuŝigas en la reton, kaj ŝi poste iom  
rearangas sian propran korsaĝon. La du plej maljunaj infanoj, lasinte  
siajn trumpetojn, sin lokas en angulon, de nun tute trankvilaj. Ĉiuj  
ekdormas, krom mi mem, mirigita de tiu ĉi rapida kvietigo.

La kvieteco daŭris ĝis ni proksimiĝis al la najbara stacio. Tiam  
denove subita ŝanĝo : ree la pipo, la patrino kun malkovrita brusto, la  
infano plorkrianta, la knaboj sonigantaj trumpetojn. Kaj poste, kiam  
la vagonaro ree foriras : paco, silento, dormo.

Tio daŭris tiel ĝis Bruselo, kien mi veturis kun tiuj ĉi kunvoja-  
ĝantoj okazaj. Kредu, mi vin petas, ke neniam vojaĝanto intencis eniri  
en nian fakegon. Kaj nun mi pripensas, ke, kredeble, la sinjoro pipu-  
mema edziĝis kaj naskis infanojn nur por ke tiel li forpelu de sia vago-  
no la malagrabluojn.

A ALLAIS.

Tradukita de F. Lallemand.  
(L'Esperantiste - 1901)

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

**Belgujo** : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

**Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

**Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

**Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (13 mark.).

**Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1<sup>a</sup>, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

**Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

**Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rødes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


**Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Cothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

**Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

**Svedujo** : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

**Svislando** : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

**Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

### Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra cent-okecidenta Francujo.

## venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo